

La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe UCSD

ĵaŭdon, la 7-an de Julio, 2011 • numero kvin

Venontaj eventoj

Ĵaŭdo (hodiaŭ)

★ 9:00 - 11:30 atm: Lecionoj

★ 2:00 - 3:30 ptm: Kromlecionoj

★ 7:00 - 8:00 ptm: Vespera programo: prezento de Vicky CRICKETT



Vendredo (morgaŭ)

★ 9:00 atm - 12:30 ptm: Lecionoj

★ 2:00 - 5:00 ptm: Ekskursoj

★ 7:00 - 8:30 ptm: Vespera programo: Prezento de Alibek DANYALOV, kaj poste vizito de profesoro Orlando RAOLA, prezidanto de Esperanto-USA



**Onklo Zam bezonas vin...
por Esperanto-USA!**

La NASKa Fasko

Redaktejo: Cuzco 117
<nask.esperanto@gmail.com>

La NASKa Fasko estas ĉiutaga informbulteno de la kursaro. Trovu ĝin matene sur la pordo de nia komuna ĉambro en Cuzco.

Se vi volas kontribui mallongan artikolon, foton, ŝercon, bildstrion, leteron, poemon, am-leteron, ktp. bonvolu alporti ĝin al la redaktejo en Cuzco 117, aŭ – eĉ pli bone – sendu ĝin al <nask.esperanto@gmail.com>.

La virino kun la granda blua valizo

de Lottie ERICSON

Post longa vojaĝo per trajnoj kaj autobusoj de Sacramento al Sandiego necesis trafi aŭtobuson numero 30 al la kampuso de UCSD. Tia tasko ne estis facila ĉar la haltejo estas kvin stratojn for de la interkruciĝo de stratoj Broadway kaj 3rd. Kiam mi trovis ĝin, mi informiĝis ke aŭtobuso numero 30 neniam iras vendrede en la nokto.

En haltejo bonŝance estis virino kiu ankaŭ iris en la saman direkton kaj proponis helpi min. Ŝi havis grandan bluan valizon kaj mi havis grandan ruĝan valizon. Ni ambaŭ tiris ilin al troleobushaltejo en alia strato. Homoj en la strato ridetis al ni kaj verŝajne pensis ke jen estis du amikinoj kiuj revenis de longa vojaĝo eksterlande.

La valizoj estis pezaj sed ni sukcesis levi ilin en la troleobuson kaj ni estis survoje al la kvartalo Old Town. Mia nova amikino estis tre babilema kaj diris al mi ke ŝi estis en urbo, Long Beach, por unu tago. Ne por unu nokto, nur por unu tago.

“Kun granda valizo?” mi demandis.

“Jes”, ŝi respondis, kapjesis sed rigardis en alian direkton. Tia respondo ne sufiĉis do mi provis alian fojon.

“Ĉu vi vere iris al Long Beach por unu tago kun granda valizo?”

Ŝi kapjesis denove kaj rigardis al sia telefono.

“Hm”, mi pensis, “estas mistere.” Mi sentis min iomete malkomforta sed mi ne demandis pli.

En Old Town ni prenis aŭtobuson numero 30 dek sep minutojn post la naŭa. Mia nova amikino babilis denove pri sia familio, pri sia laboro, pri sia vivo. Mi aŭskultis ŝin kaj ankaŭ provis montri al ŝi mapon de la kolegio Eleanor Roosevelt sed ŝi ignoris ĝin. Mi fariĝis nervoza, stariĝis kaj iris al la buskondukisto kun mia mapo.

“Mi ne konas vian kolegion. Mi ne studas tie. Mi neniam aŭdis pri la strato North Scholars Drive. Mi lasos vin ĉe la

plej proksima haltejo ĉe North Torrey Pine Drive”, la kondukisto diris kun malagrabla voĉo.

Mi rapide prenis mian ruĝan valizon, rapide dankis kaj adiaŭis mian novan amikinin kun blua valizo kaj eliris aŭtobuson numero 30. Estis tre malfrue kaj la nokto estis malluma. En kiu direkto estis la kolegio? Al la dekstra aŭ al la maldekstra?

Mi elektis maldekstran direkton. Mi piediris trans la straton esperinte vidi homojn en alia flanko sed en universitato neniu promenis noktomeze. Mi estis sola en la trotuaro kun mia ruĝa valizo. La bruo de radoj estis laŭta en la nokta silento. Iom mi pensis ke iu sekvis min. Mi timis kaj piediris pli rapide. La valizradoj nun laŭtegiĝis.

Esperinte pri mallonga vojo mi transiris parkejon en la kolegio Muir. Tie mi renkontis gevirojn. Ili estis ĉinoj kaj ne parolis la anglan. Tiam mi ankaŭ trovis grandan informomapon sed mi povis legi nenion en la malluma nokto. Mi daŭrigis kun tre lacaj kruroj kaj piedoj.

“Strato Pangea, Strato Pangea, kie estas ĝi?” mi preskaŭ kriis multfoje kiam mi estis denove sola en la trotuaro. Sed ne necesis kii ĉar en malproksimo mi subite vidis stratoŝildon sur alta stango. Mi povis vidi la literon “P” en la komenco de vorto.

“Pangea! Pangea! Konferenca Centro! NASK! Esperanta kurso! Ellen!” Mi aŭdis voĉon. Estis la mia.

Kiam mi metis mian kapon sur la kusenon je la dek unua kaj fermis miajn okulojn mi pensis pri mia nova amikino. Mi sciis ŝian tutan vivon sed mi ne sciis ŝian nomon kaj mi ne sciis kial ŝi vojaĝis al Long Beach kun sia granda blua valizo.

Tamen, ŝi gajnis flugilojn tiun nokton. Ŝi helpis min de bushaltejo en kruciĝo de Broadway kaj 3rd al la kampuso de UCSD. Ŝi ŝparis al mi multe de mono. La prezo por mia nokta vojaĝo estis nur du dolaroj kaj tridek kvin cendoj.

Birke malaperis

De “La Ŝafino”

La studentaro de NASK skandaligis lunde posttagmeze pro la mistera malapero de la profesorino Birke. Ŝi estis laste vidata ĉe la marklifo kun la studanto Javier.

Javier estas tiu kiu fine atingis NASK post danĝeraj kaj minacaj spertoj, venante de la fora lando de Argentino.

La mistero pli profundiĝis kiam la studentino Ana, el Bulgarujo, ridante konfesis “Mi perdis Birke.”

Ĉu Ana intence perdis Birke pro teruraj hejmtaskoj? Ĉu estas internacia komploto kontraŭ la profesorino? Ĉu Ana kaj Javier planis malaperigi Birke ek de antaŭ NASK? Kiuj plu el la NASKanoj iris per tiu danĝera vojo al tiu mistera plaĝo, kaj ne konfesas?

Oni diras ke la estroj de NASK invitis Birke kiel profesorinon pro ŝia sperta kono de la fako de interpersonaj komunikadoj. Ĉu ŝia kapablo rompi la kodon de la konfuzemaj kondutoj minacis internacian komploton? Ĉu povus esti eĉ universala komploto? Ĉu la lunaj zombioj penas kapti ŝin? Ĉu Bertilo serĉus ŝin?

Surprize kaj tre malfrue, finfine aperis la ruĝigita kaj ŝvitanta Birke kun Javier. Ili raportis pri labirinto kiu kaptis ilin. Ĉu Javier malsukcesis en internacia komploto? Ĉu la internaciaj malbonuloj maldungos lin kiel perdiĝinton?

Eĉ pli kurioze, kiam oni demandis al Javier, “Kio okazis?”, lia respondo estis: “Sidigu min kaj donu libron al mi por legi!”

Demandante pri la tuta afero al Ellen EDDY, estrino de NASK, ŝi diris: “Oni neniam perdiĝas ĉe NASK. Oni perdiĝas en granda urbcentro. Oni perdiĝas ĉe granda parko. Oni perdiĝas en arbaro. Oni perdiĝas en granda maro. Oni neniam perdiĝas NASKe.”

Ŝerco

Kiel lerni Esperanton en la ĝangalo

Ĉe landa kongreso en Usono, raportisto intervjuis al interesa gasto el Afriko:

Raportisto: Saluton. Mi aŭdis ke vi venis de iu ĝangalo en Afriko. Ĉu?

Afrikanano: ŝkhzzz huphup zksksks dzhdz ksksksk Jes, mi naskiĝis en la ĝangalo, kaj loĝis tie mian tutan vivon ĝis iu donis al mi la eblecon veni al ĉi tiu kongreso. Xkxkxkx rrr huphup zkdkdzz.

Raportisto: Ĝu vi ĝuas la kongreson?

Afrikanano: rŭhzhkŭ Jes, tute jes. Mi renkontis tiom da novaj amikoj! Ĉi tio estas mirinda sperto! Kxkxrr huphup ĥkjdhrrkkj.

Raportisto: Do, kiel vi lernis Esperanton?

Afrikanano: ĥkjdhrrkkj Per mallongonda radio. ŝkhzzz huphup rŭhzhkŭ.

[*Dankon al Filipino pro la ŝerco!*]

Leteroj

[*En pli frua letero de Maria, mencion de “pioniroj” mi ŝanĝis al “veteranoj”. Jen letero kiu korektas tiun eraron. –Red.*]

La unuajn esperantistojn ni nomas “pioniroj” – la UEA ankoraŭ ne ekzistis. Veteranoj estas esperantistoj kiuj estis membroj de UEA almenaŭ 40 jarojn.

Docento – 50 jarojn, pli ol 60 ni povus nomi “bonŝanculojn”.

Mi volus preni nun tempon por instigi vin ĉiuj iĝi dumvivaj membroj de UEA. Tio ŝparus al vi monon kaj tempon. UEA bezonas vin, Esperanto bezonas vin!

– Maria

Ligiloj de la kromleciono de Bertilo pri landnomoj

- *Listo de Rekomendataj Landonomoj*
(Akademio de Esperanto, 2009)
akademio-de-esperanto.org/decidoj/landnomoj/
listo_de_rekomendataj_landnomoj
- *La nova Akademia elpaŝo pri landnomoj*
lingvakritiko.com/2009/05/17/
la-nova-akademia-elpasho-pri-landnomoj
- *Kio estas nova en la Listo de Rekomendataj Landonomoj?*
lingvakritiko.com/2009/05/22/
kio-estas-nova-en-la-listo-de-rekomendataj-landnomoj
- *Kial ne Luksemburgio?*
lingvakritiko.com/2009/05/24/kial-ne-luksemburgio
- *Landanoj, gentoj kaj kategorioj*
lingvakritiko.com/2009/06/13/landanoj-gentoj-kaj-kategorioj
- *Landoj kaj lingvoj de la mondo*
bertilow.com/lanlin